Nikolaus Lenau,

Al la fora amatino

tradukita de Manfred Retzlaff

Tiun rozon plukas mi
En forega tia´,
Ŝatus porti ĝin al vi
Karulino mia.

Sed ne estos mi ĉe vi,
Antaŭ ol velkinta
Estas rozo, kiun mi
Estas detranĉinta.

Plu ne iru iu for,
Iu hom' amanta,
Ol en man' portata flor'
Restas plu floranta;

Aŭ ol flugas najtingal'
El la nesto ien,
Aŭ ol sonas en la val'
Ĝia kanto ĉien.

Traduko de la Germana poemo "An die Entfernte" de NIKOLAUS LENAU *(∗1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

Arg-626-1266 (2012-10-26 12:08:28)

Pri la poeto viud la retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau`.